# KIEL DIRI TRIMANIERE

(12-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**
**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**





Kio estas tio ĉi kaj

kio estas tio malproksime supre?

Ĉi tio estas portbotelo, kaj tio tie estas flugroboto.



Kio estas tiu ĉi objekto kaj kio estas tiu super ĝi?

Ĉi tiu objekto estas kompufono, kaj tiu alia estas flugroboto.




Kio estas ĉi tiu afero proksima kaj kio estas tiu afero fluganta malproksime?

Tiu ĉi proksima afero estas nom-ŝildo, kaj tiu malproksima afero estas flugroboto.

1. **Ĉu vi havas portboteleton? Se jes, kia ĝi estas? Kiel, kie kaj kiam vi utiligas ĝin?**
2. **Kiu estas via kompufono? Kia ĝi estas?**
3. **Kiam vi pli ofte aliras la Interreton? Ĉu per via kompufono, aŭ per komputilo?**
4. **Se vi uzadas nomŝildon ĉiutage, kiu nomo kaj kiu posteno legeblas sur ĝi?**
5. **Kiam vi portis nomŝildon en kongreso, seminario aŭ konferenco lastfoje?**



Kies filo vi estas?

Mi estas filo de Asdrubalo kaj Margareto.



De kiuj vi estas filino?

Miaj gepatroj estas Karolo kaj Irma.



Kiuj estas viaj patro kaj patrino?

Ili estas Noguto kaj Madoka.

1. **Kies filo aŭ filino viaj gepatroj estas?**
2. **Kies nomojn havas viaj gepatroj?**
3. **Kiuj estis la gepatroj de Jesuo?**
4. **Kio via estas la nepo de via patro?**
5. **Kio via patro estas de via nepo?**








Kiom da mono vi posedas por vojaĝi alilanden?

Mi havas nemultan monrimedon.

Kiom vi havas de mono por veturi eksteren de la lando?

Mi posedas ne multon.

Kiom vi havas en la poŝo por iri en la eksterlandon?

Mi tenas malmultajn groŝojn rezervitajn por tio.

1. **Kiom vi havas por vojaĝi Eŭropon (aŭ eŭropen)?**
2. **Ĉu vi iros Portugalion por partopreni la venontan UK-on? Se jes, kiom vi pagis por la veturo?**
3. **Kiom da mono vi rezervis por tia vojaĝo, inkluzive de la gastiĝo kaj nutriĝo?**
4. **Kiom kostas la aliĝo al tia monda eventego?**
5. **Kiom vi havas de mono por elspezi entute en Portugalujo?**



Kio estas tio, kio malvarmetigas tiun hundon?

Tio, kio malvarmetigas ĝin, estas kilmatizilo, kiu klimatizas ĝian ĉirkaŭon.



Kio estas tio ventolanta tiun ĉevalidon?

Tio ventolanta ĝin estas ventolilo.



Kies nomon havas tio, kio faras venton al tiu homino?

Tio, kio faras venton al ŝi, havas la nomon ventumilo.

1. **Se tie, kie vi estas, ofte varmas, per kio (aŭ kiel) vi ofte ventumas vin? Ĉu per ventumilo, aŭ per ventolilo?**
2. **Kia ofte estas la temperaturo en via regiono?**
3. **Kio okazas en via urbo nuntempe? Ĉu neĝo, pluvaro, aŭ sekeco?**
4. **Kiu estas la meznombra jara temperaturo en via lando?**
5. **Kiom da gradoj havas la klimatizilo en via laborejo?**
6. **Se ĝi havas klimatizilon, kiel klimatizita estas via laborejo?**
7. **Kia estas la elektra tensio en via domo? Ĉu 110-volta aŭ 220-volta?**
8. **Kiom da voltoj havas la elektro en Lisbono?<br>Ĉu 110 voltojn, aŭ 220 voltojn?**







Dum kiom da tempo vi piediras por korpa ekzercado?

Plej ofte po du horoj tage.

Dum kiom da tempo vi marŝas por ekzerci la korpon?

Kutime po duonhoro en ĉiu semajno.

Kiun tempon vi uzadas por marŝi ekzerciĝe?

Mi uzas la tempon de la tuta vivo.

1. **Kiom longe vi marŝas ĉiutage por ekzerciĝi?**
2. **Kiajn piedvestojn vi uzadas por piediri ekzerciĝe? Ĉu sportŝuojn, bekformajn ŝuojn, glitŝuojn, sandalojn? Kiajn?**
3. **Kiom da kilometroj vi povas marŝi ĝislace?**
4. **En kiu tagoparto vi preferas ekzerciĝi? Ĉu frue en la mateno, meze en la vespero, aŭ malfrue en la nokto?**
5. **Kiuj estas viaj plej preferataj sportoj por praktiki kaj por spekti?**



**Kial pluvas tiel multe hodiaŭ?**

**Ĉar la junulino de la vetero antaŭanoncis tion.**



**Pro kio pluvegas hodiaŭ?**

**Pro tio, ke hieraŭ tro multe tondris.**



**Kaŭze de kio pluvas senĉese hodiaŭ?**

**Kaŭze de tio, ke jam hieraŭ la ĉielo plenis je densegaj nuboj.**

1. **Kia estas laste la temperaturo en via kvartalo?**
2. **Kaj la vetero tie, kie vi vivas? Kia ĝi estas lastatempe?**
3. **Kiel vi fartas, se laste vi travivas tre altan temperaturon?**
4. **Kiel fartas vi, se la temperaturo tie, kie vi loĝas, estas tre pli varma ol kutime?**
5. **Se vi estas en medio, kie neĝas nuntempe, ĉu tio estas plaĉa (aŭ agrabla) al vi? Kial?**
6. **Kion vi vestas, se estas tro malvarme al vi hodiaŭ?**
7. **Ĉu ankaŭ vi opinias, ke la klimato de la tuta Tero estas freneza de kelkaj jaroj? Kial?**

Po kiom da fojoj vi alfrontas aŭtobloka-dojn en la stratoj semajne?

Po tri fojoj semajne, averaĝe.



Kiom da blokadoj de aŭtoj vi spertas en la urbo ĉiusemajne?

Mi spertas ĉirkaŭ kvin da ili en ĉiu semajno, meznombre.

Kiu estas la kvanto da blokadoj de aŭtovojoj, kiujn vi travivas dum la semajno?

Mi travivas sep tiajn blokadojn tra la semajno, pli aŭ malpli.

1. **Kiam la aŭtotrafiko en la grandurboj pli intensiĝas dum la tago?**
2. **En kiuj tagoj de la semajno la trafiko estas ofte malpli granda?**
3. **Kio povas okazigi blokadojn de aŭtovojoj ankaŭ en la nokto?**
4. **Kie ĝenerale okazas pli da trafik-ŝtopiĝoj? Ĉu en la urbocentro, aŭ en la ĉirkaŭo de la urbo?**
5. **Kial la aŭtomobiloj movataj je elektro ankoraŭ ne estas vaste komercigataj, se ili faras multe malpli da bruo kaj ne emisias karbondioksidon?**






Kiu el vi konas la pasvorton de Wi-Fi?

Mi tute ne konas ĝin.

Kiu scias la vifian pasvorton?

Neniu tie ĉi scias ĝin.

Kiu havas la pasvorton de la Vifio?

Mi ne havas ĝin, sed mi aŭdis, ke ĝi estas senpaga tie ĉi.

1. Kiu estas la pasvorto de la Vifio, kie vi loĝas? Ĉu vi povas diri al mi?
2. Kie situas la modemo de via reto de Vifio?
3. Kiom da interretujoj (komputoroj, tabulkomputiloj, kompufonoj ktp) povas konektiĝi al via reto de Vifio?
4. Kiuj aparatoj de la loka reto, kie vi loĝas, estas konektataj al la Interreto per Wi-Fi?
5. Kie en via urbo la Vifio estas tute libera (sen pasvorto)?





Ĉu vi povas prunti al mi vian kapaŭskultilon por momento?

Sendube!

Ĉu eblas al vi pruntedoni al mi vian aŭskultilon momente?

Kompreneble!

Ĉu mi povas uzi rapide vian aŭdilon?

Estas ja!

1. **Kie vi plej ofte uzas kapaŭskultilon?**
2. **Kion vi kutimas aŭskulti per via aŭskultilo?**
3. **Kia estas via orel-aŭdilo? Ĉu sterea, aŭ nesterea?**
4. **Kiam plej ofte vi uzas vian kapaŭskultilon?**



**Kial la operatoroj de televendado nepre uzadas aŭd-parolilon?**



**Kial la laboristoj sur parkejoj de flughavenoj ĉiam bezonas uzi orel-protektilon?**








Kie troveblas retbutiko tie ĉi?

Mi tute ne scias.

Kie mi povas trovi interret-butikon en la ĉirkaŭaĵoj?

Mi neniam vidis tian butikon tie ĉi.

Kie situas interret-alirejo proksime?

Mi konfesas, ke mi ne scias.

1. **Kie situas la interret-alirejo plej proksima de tie, kie vi loĝas?**
2. **Kiom da kilometroj ĝi distancas de via domo?**
3. **Kiom kostas la aliro al Interreto tie?**
4. **Kion vi serĉis, esploris aŭ vidis en la Interreto lastfoje, kiam vi iris al retbutiko? Ĉu vi ankoraŭ memoras? Aŭ ĉu tio okazis antaŭ tre longe?**
5. **Kion vi manĝis aŭ trinkis tiam, kiam vi vizitis ret-kafejon la lastan fojon?**



Kiu itinero estas la plej taŭga por atingi la dancejon?

Prenu buson al
la kvartalo Eseno.

Tra kie mi povas atingi
la danceterion pli rapide?

Tra la Placo Zamenhof.

Kiu irvojo estas la plej bona por venigi min al la dancodomo?

La plej bona estas tiu tra la tunelo.

1. **Kiun itineron vi trairas por veni en vian lernejon aŭ laborejon? Ĉu ĝi estas longa, aŭ mallonga?**
2. **Tra kie vi kutimas marŝi ekzerciĝe?**
3. **Kiom da stratoj estas en la itinero, kiu kondukas vin al via lernejo aŭ laborejo?**
4. **Kiam vi perdiĝis lastfoje, serĉante lokon en alia urbo? Kiel vi retrovis la ĝustan irvojon, aŭ la ĝustan celatan lokon?**
5. **Kiu estas la itinero plej mallonga por atingi la feliĉecon?**



Kial vi dancas tiel bone?

Mi havis bonan instruiston.



Kiu instruis vin danci tiele?

La nokto instruis min de longe.



Kio igis vin danci tiel lerte?

La bezono pergajni la vivon dancante.

1. **Kiun stilon de danco vi plej preferas danci?**
2. **Kia ritmo plej agrablas al vi en la dancosalono?**
3. **Kiu estas pli facile dancebla, ĉu rok-en-rolo, valso, lambado, sambo, salso, tango...? Kiu?**
4. **Kun kiu vi dancis duope lastfoje? Ĉu vi memoras?**
5. **Kie kaj kiam vi dancis la lastan fojon?**
6. **Ĉu vi dancis en la arta vespero de la lasta kongreso de Esperanto?**

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

